

neodobritel'no (neaprobe),
neodobrenie (neaprob/ec/o),
ne hvalit' (ne laŭdi).

“Timu ne akrajn kritikojn, sed dolĉajn laŭdojn” (*Baratynskij*).

La vortaro de konceptosfero priskribas verban prezentadon de konceptoj kunligitaj situacie. La priskribo enhavas bazajn leksemojn, iliajn derivaĵojn, antonima-sinonimajn liniojn, kunligeblecon, kiu permesas al tia aŭ alia leksemo eniri en la semantikan kaj pragmatikan strukturon de la propozicio, same kiel frazelogismojn kaj aforismojn (proverbojn) semantike proksimajn de la baza leksemo.

Leksika kunligebleco, larĝe montrita en la vortaro, estas tre firme ligita kun koncepta analizo, ĉar ĝi aperigas tutan strukturon de lingva scio, kaŝita en la vorto.

En la prezentado de lingva materialo respeguliĝas ĉefaj funkcioj de la lingvo: komunika, nominativa, kognitiva, interpreta kaj modal-pritaksa. La rilatoj sinonimaj, antonimaj, derivantaj, kiuj estas larĝe prezentitaj en la vortaro, ne formas fermitan sistemon, sed eniras semantikan kampon, kiu plilarĝigas tian aŭ alian aspekton de baza koncepto. Necesas substreki, ke “ĝuste la koncepto difinas la semantikon de lingvaj iloj, uzitaj por esprimi ĝin” (*Popova & Sternin*, 1999). La iloj pere de kiuj ni esprimas konceptojn, malsamajn laŭ enhavo kaj larĝeco, varias en larĝa diapazono: de apartaj semoj ĝis kuniĝo de kelkaj semantikaj kampoj. Diversaspektaj kaj multbranĉaj konceptaj rilatoj, kreantaj komplikajn konceptajn retojn, sendube respeguliĝas ankaŭ en la karaktero de la semantikaj ligoj, aperigantaj dum modelado de leksika sistemo.

Literaturo

Lihaĉev D.S. : Konceptosfero de la rusa lingvo II. Rusa lingvoscienco, Moskvo, eldonejo Akademio, 1997.

Popova S.D. & Sternin I.A. : La ideo de koncepto en lingvistikaj esploroj. Voroneĵ, 1999, p.22

Ubijko, V.I. : Konceptosfero de interna homa mondo en la rusa lingvo II. Funkci-kognitiva vortaro, Ufa, 1998.

Adreso de la aŭtorino

UBLJKO Vera Ivanovna
 Str. Mendeleeva 177/2, loĝ. 212
 RU – 450 080 – Ufa / RUSIO

Priaŭtora informo

La aŭtorino estas doktoro pri filologio kaj docento ĉe Baŝkiria Ŝtata Universitato, Ufa, RUSIO

Scienca eĥo

Fariĝu lumo!

Kiun gason oni uzis en la 19-a jarcento? Ekde la fino de la 18-a jarcento oni uzis por la stratlumigado de urboj – poste ankaŭ por hejtado kaj kuirado – la karban gason, ankaŭ nomata “lumgaso” aŭ urbogaso. Oni ekstrakte produktis ĝin, interalie, per sengasigado de karbo: kiam oni varmigas karbon (sen allaso de aero) al temperaturoj inter 90 kaj 130° C, tiam eliĝas miksaĵo de gasoj kaj likvaĵoj, konsistantaj el akveca amoniaksolvaĵo, karba gudro, kaj ankaŭ lumgaso. Kiel firma materio postrestas la (en tiamaj tempoj treege ŝatata) brulaĵo “koakso”. Aliaj metodoj de la lumgasproduktado estas la malkombino de hidrogena karbido respektive hidrokarbonido (likvaĵa gaso, benzino) per akvovaporo, kaj la karbogasigado. Intertempe la lumgaso estas vaste anstataŭita per la tergaso. Tiu lasta estas pli “bonnatura”. (2001-02-21)

Ne kalkuleble per kvin fingroj

Temas pri la lumrapido. Kiam kaj kiel kalkuli ĝin? Ĝi estis por la unua fojo determinita de la dana astronomo *Ole Romer* (1644-1710). La kalkulado rezultis el la observado de la planedo Jupitero kaj ties lunoj, kiuj rivoluas ĉirkaŭ ĝi kun precizeco de horloĝmeĥanismo. Dum tio ili ĉiam denove eniras kaj eliras la planedan ombron. Tamen ŝajnas, ke la mallumigtempo varias de rivoluo al rivoluo. Kiam la Tero proksimiĝas al Jupitero dum sia ĉirkaŭsuna orbito, la ombrofazo ŝajnas fariĝi pli mallonga – kaj aliflanke pli longa kiam ĝi malproksimiĝas. Tion kaŭzas la tempo, kiun trapasas la lumo survoje de Jupitero al Tero. Kaj el la ombraj intervaloj, la fazoj de la Teraj movoj en rilato al Jupitero kaj la diametro de la Tera orbito estas kalkulebla la lumrapido. (2001-03-17/18)

Samtempa ridado kaj plorado

Ĉe la germanlingva esprimo “muzikista osto” nek temas pri osto nek pri osta muzikilo aŭ iu ajn muzikista propreco. La mirinda kaj multkonata fenomeno plej ofte ekagas, kiam nia kubuto fortfrape trafas akran eĝon. En tiu ĉi okazo ne dolorsentiĝas ostoparto, sed la ĉefa nervofasko de la tuta brako. Kaj post koncerna forta frapricevo, ĉiuj nervoj eksendas kvazaŭ fajrobrigad-piroteĥnikan amason da informoj al la cerbo. Per tio la povra cerbo estas ĝisfunde troŝarĝita kaj tute ne scias, kiel interpreti la informlavangon. Unue la impulsoj ne estas precize lokalizeblaj. Ili ŝajne venas de la tuta brako. Kaj **pri kio** ili informas? Ĉu pri malvarmo? Pri varmego? Pri doloro? Pri tiklosento?